

Hodiaŭ je la 7-a ptm: ludovespero en la salono

Ĉu vi iam ajn ludis Skrablon (angle: *Scrabble*) en Esperanto? Hodiaŭ, **en la komuna salono je la 7-a vespere**, ni renkontiĝos por manĝi kuketojn kaj esplori diversajn lingvo-ludojn en Esperanto: bretludojn kiel skrablon, kartludojn kaj tiel plu.

Hoss prezentos facile porteblan vortludon el Japanujo nomitan “Vorto-Mozaiko”, kaj Brandon prezentos ne nur unu sed **du** ludojn: “Ŝarado” kaj “Lupfantomo”, en kiuj la partoprenantoj povas aktori.

Se vi kunportis ludon al NASK, bonvolu kunporti ĝin al la vespera programo!



Kalembura kadro



La solvo por la lasta numero estis “konk-urso”.
La hodiaŭa vorto estas: ____ - **E** ____.

Ĝis malfrue daŭris akra bruo malgraŭ frapo per la sakra ŝuo. Kontraŭ plankon batis al la du balailon homo kun fi-ĝuo.

Tamen tio ne rezultis bone sed laŭtigis voĉojn des pli drone. Ne plu eblis plendi tra-plafone nek minaci sone kaj impone.

Do alvokis pordo la viktimon. Li esprimu sian malestimon por instige doni najbar-timon. Sed ignoris fraŭloj la kutimon!

Do rezigno venkis kiel ŝtormo. Ĉu sufero estos nova normo? Kia estos lia laca formo? Kiam venos (aŭ ĉu venos) dormo?

—Aĉjo

El la kalendaro

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝos ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

| | hodiaŭ | mardo | merkredo | ĵaŭdo |
|--------------|--|-------------------------|--|-----------------------|
| matene | klasoj | klasoj | klasoj | klasoj |
| post-tagmeze | <i>libera</i> | 2 ptm: tefesto kun Jody | 2 ptm: Ekskurso al Monteto <i>Soledad</i> | 2 ptm: trezorserĉado! |
| vespere | 7 ptm: ludovespero en la komuna salono | <i>libera</i> | 7 ptm: Bertilo prelegas pri la <i>Universala Vortaro</i> | <i>libera</i> |

Hieraŭ nokte, mi vidis “youtube” kaj mi havis penson: se vi uzas problemigan lingvon kiel la anglan por priskribi problemojn en Esperanto, mi povas kredi ke Esperanto ne gravas sufiĉe al vi.

Se vi uzas Esperanton por priskribi problemojn en Esperanto, vi montras ke ĉi tiuj ne gravas tro.

—Vido



Posttagmeze Steĉjo emas ĵongligi la preterpasantojn antaŭ sia ĉambro. Ĉu li gvidos posttagmezan programon pri ĵonglado? Ni atendu...

Pliaj ekskurso-ideoj

- ★ Malstreĉa promeno kun Grant tra la kolegio *Muir* por informiĝi pri ĝia modernisma arĥitekturo
- ★ Ekskurso al la plaĝo *Mission Beach* por gustumi la kalifornian surf-kulturon
- ★ Semajnfina ekskurso al la parko *Balboa* kaj la tiea bestoĝardeno
- ★ Promeno kun Meja por vidi diversajn artaĵojn ĉe UCSD

Se vi volas prezenti ion ajn dum la venontaj du semajnoj, **bonvolu paroli al Hoss kiel eble plej frue!**

Kie troviĝas la poŝtoŭicejo?

Kelkaj el ni jam trovis la lokon. Se vi serĉas lokon por aĉeti poŝtmarkojn, sendi leterojn aŭ pakajojn, jen la direktoj:

Sekvu *Library Walk* ĝis tuj antaŭ la biblioteko Geisel.

Turniĝu dekstren ĉe sennoma vojo kaj sekvu ĝin post la bluaj ombreloj, post la ripozejo *Lounge*, kaj tiam turniĝu denove dekstren. Vi vidos enirejon en vitra konstruaĵo. Tuj post eniri, turniĝu maldekstren kaj vi vidos la poŝtoŭicejon. Gratulojn. Ĝi estas malfacile trovebla. —Ellen



[Mi serĉis plian informon en la reto, kaj supozeble la oficejo estas ĉambro #242 en la *Price Center* —Hoss]

Ĵaluzo de virino

de Helen FARAJI

Karaj geamikoj, saluton.

Eble kelkaj el vi jam konas min, ĉar pasintjare kun granda plezuro mi ĉeestis en ĉi tiu plaĉa atmosfero. Nun mi volas rakonti al vi unu el multe da memoraĵoj kiujn mi travivis dum mi estis edzino de alilanda esperantisto. Ni korespondis naŭ monatojn sen vidi unu la alian, kaj poste lasis la patrujon kaj instruistinan laboron por loĝi en alia lando, kie ni eĉ unu vorton ne komprenis.

Ni starigis Esperantan turistagentejon en Istanbulo (Turkujo) kaj luis kampon ĉe la maro por turistoj. Tiam venadis multe da poloj al Turkujo por aĉetado kaj vizito. En tiu tempo ni ĉiam havis esperantistajn grupojn, kiuj unue ekloĝis ĉe la maro kaj poste ŝipe vojaĝis al Istanbulo.

Iam la pola gvidantino demandis min, “Kie estas via edzo? Li devus pagi al mi pro mia laboro.” Mi respondis ke li ofte devus resti en Istanbulo, por aranĝi aliajn aferojn. Ŝi diris, ke mia edzo restis tie kun iu pola belulino; pro tiu li ne revenis kun ni. Kvankam mi bone konis mian edzon, ke li estis fidela, tamen mi estis ege kolera kaj la tutan nokton ne plu dormis. Frumatene mi prenis taksion sen pensi ke en tiu malluma horo, de kampo ĝis maro kaj ŝipo, estus danĝere aparte por fremda virino.

Kiam li konstatis ke mi ne estas turko pro mia prononc-maniero, la taksisto komencis ŝerci kun mi. En tiu momento mi ege timis kaj komencis diri al li la veron; eble li kompatus min. Mi rakontis al li, kial en tiu horo mi volis iri al Istanbulo. Feliĉe li tuj ŝanĝiĝis kaj serioze diris, ke “eĉ mi estas preta per mia taksio pli rapide porti vin tien” (ĉar turkoj estas ofte ĵaluzaj). Mi dankis kaj diris ne, sufiĉas rapide atingigi min la unuan ŝipon. Mi pagis pli da monon kaj adiaŭis lin.



Meĵa JUNA

Post du horoj mi atingis hotelon kaj demandis pri mia edzo. La hotelisto diris ke li iris al restoracio, kaj mi pensis ke li kun amikino sidus ĉe tablo kaj mi kaptus ilin... Tamen la suspekto ne estis vera, mi vidis ke li starante legas gazeton. Kiam li vidis min kaj kun granda miro demandis “Kial?”, mi respondis “Diru al mi: kie estas via kara belulino?”

“Pri kiu vi parolas?” li demandis. Mi respondis “Ne mensogu, ĉar la gvidantino raportis ke vi restis ĉi tie kun belulino.” Li longe rakontis, kio okazis. Fakte tiu belulino malsaniĝis kaj ŝi devis resti en hospitalo. Li devis resti en Istanbulo ĉar, se io okazus, li devus traduki kaj elspezi kaj aranĝi ĉion. Post kiam mi konstatis la veron, denove mi revenis al la kampo. Tia estis la ĵaluzo de virino.

Pli da komputiloj haveblas

Ĉiuj komputiloj en la interreta klasĉambro (en la lingvo-laboratorio) estas nun uzeblaj por **ĉiuj lernantoj**. Antaŭe, pluraj estis uzeblaj nur se oni havas specialan konton (kiun niaj lernantoj ne havas), sed jaŭde oni ŝanĝis tion. —Grant

